



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 11/77 - 14 mar 77
Aperas ĉiusemajne

ĈENSTOĤOVA

POLLANDO

17-21.VIII.1977



Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113 1
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 514269
Psk. Nürnberg 819 56-851

Semajno de Internacia Amikeco en Pécs

Partopreno de Delegacioj el Pollando kaj Jugoslavio

Pécs (pp) - El la sudhungara urbo Pécs atingis nin du salutkartoj, de partoprenantoj en la granda internacia aranĝo okaze de la Semajno de Internacia Amikeco. Salutis Roman W. Rutkowski, redaktoro de la pola gazeto "Dziennik Wieczorny, Bydgoszcz" kaj Jerzy Uspienski, redaktoro de Pola Radio.

S-ro Uspiensky krome informas: Surbaze de la kontrakto pri kunlaboro inter Pola Esperanto-Asocio (PEA) kaj Hungara Esperanto-Asocio (HEA), subskribita en 1971-a jaro oni volas kunlaborigi ankaŭ la lokajn (teritoriajn) unuojn de ambaŭ organizaĵoj.

La unua formala interkonsento pri tia regiona kunlaboro estis subskribita ĝuste en Pécs dum la semajno. Ĝin subskribis Filio de PEA en Gdansko kaj Departementa Esperanto-Komitato en Pécs. La interkonsento krom ĝeneralaj indikoj pri la kunlaboro enhavas ankaŭ konkretajn decidojn, ekz. pri interŝanĝo de lernejanov, de artensembloj, partopreno en aranĝoj aŭ pri organizo reciproka de polaj-hungaraj tagoj. En la realigado de la interkonsento kunlaboros ĉiuj lokaj grupoj de respektivaj teritoriaj Esperanto-instancoj.

La interkonsento estas grava paŝo al realigo de la ideo pri ORGANIZITA, t.e. pripensita, laŭplana kunlaboro internacia de esperantistoj je loka nivelo. Laŭ la konfirmo, kiun donis la nuna SIA en Pécs, tia organizita kunlaboro ebligas ne nur vigligen de la loka agado - sed ankaŭ aŭ ĉefe interesigon kaj subtenon de gravaj lokaj organizaĵoj aŭ instancoj. Pruvis tion ĉi la akceptoj kaj diskutoj de la eksterlandaj gastoj kaj hungaraj aktivuloj ĉe Departementa Komitato de Hungara Patriota Popolfronto aŭ ĉe Urbestro de Pécs.

En la SIA-aranĝo partoprenis 46-persona delegacio de PEA, ĉefestraranoj kaj gvidantoj de Filioj de PEA, dekkelkpersona delegacio de Osjek, Jugoslavio kaj gvidantoj de Hungara Esperanto-Asocio. La semajno pasis tre sukcese, kun specialaj afiŝoj, E-flagoj ktp. La gastoj de la semajno vizitis 4 elementajn lernejojn de Pécs kun regula laŭhorara Esperanto-instruado; en ĉiu lernejo 100 infanoj lernas Esperanton.

Pri la aranĝo baldaŭ raportos Radio Varsovio dank' al la ĉeesto de Jerzy Uspiensky.

Pri la IKUE-Kongreso en Ĉenstohova

Jus aperis belaspektaj, arte faritaj glumarkoj pri la 37-a IKUE-kongreso en Ĉenstohova, Pollando, de la 17-a ĝis la 21-a de aŭgusto 1977. La glumarkojn planis kaj desegnis pastro Urban Koch, Lahnstein, F R Germanujo, kolego de la instruistaro de Johannesgimnazio, kie ankaŭ instruas d-ro J. Kondor. La signoj UK, la signoj de la pastro-artisto Urban Koch estas videblaj sur aŭ sub multaj artaj verkoj, bildoj, statuoj, murdekoracioj ktp. La prezo por 1 folio estas ĉ. 1,50 GM, sur 1 folio troviĝas 20 glumarkoj. Ili estas haveblaj ĉe D-ro J. Kondor, Alte Schloßstr. 25, D-5450 Neuwied 21, F.R. Germanio. Pri la IKUE-kongreso, la preparoj kaj programo ni raportos en la venonta numero de PP.

Ce-balta Esperantista Printempo

Koszalin (pp) - Pola Esperanto-Asocio, Filio Koszalin, kune kun Kultura Komisiono de la Ĉefa Estraro de PEA, Urba Kulturcentro en Koszalin kaj Koŝalina Socikultura Asocio invitas al internacia esperantista renkontiĝo, la Dua Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno-Uniescie, ripozcentro de la entrepreno "Jelcz", str. Esperanto 1, de la 20-a ĝis la 26-a de majo 1977.

En la programo oni antaŭvidas aŭtobusajn ekskursojn, finalon de la literatura konkurso pri traduko de nuntempa pola prozo en la internacian lingvon, sesion dediĉita al la Esperantlingva merkado de Kazimierz Bein (KABE) kun prelego de A. Pettyn.k.a.

La prezo por la septaga restado, inkl. loĝadon, manĝojn kaj programon, egalas al 1 000 zł. aŭ ĉ. 30 US-Dolaroj.

Informojn donas: Pola Esperanto-Asocio, Filio Koszalin, Poŝtkesto 30, PL-75-950 Koszalin, Pollando.

Varsovio (pp) - Informa Servo de PEA sciigas: Amatora, sed tamen profesnivela teatro "RONDO" el Słupsk, aganta ĉe la tiea Vojevodia Kulturdomo, preparas nun por enscenigo sian unuan teatraĵon en Esperanto. Ĝi estas titolita "Rakonto pri libereco" kaj ĝia aŭtoro estas Stanisław Miedziowski. En la teatraĵo oni utiligis poemojn de E. Jevtuŝenko, A. Mieckieviĉ, prozon de K.T. Toeplitz kaj gazetinformojn pri la spektakloj de Performance Group kaj Teatr Du Soleil. Tiun ĉi avangardan teatraĵon tradukis en Esperanton Andrzej Pettyn. La spektaklon oni prezentos dum la Dua Baltmara Printempo Esperantista en Mielno apud Koszalin, Norda Pollando. (Vidu la supran informon!)

Grava kultura evento

Florenco (pp) - Jaŭde, la 17-an de februaro 1977, okazis en Florenco, en la mirinda salono de "200" en Palazzo Vecchio "Lectura Dantis" (legado pri Dante) en la lingvoj Itala kaj Esperanta.

Grave estas ke organizis la altnivelan kulture aranĝon la jenaj neesperantistaj asocioj: "Associazione Internazionale Toscani ne mondo" (Internacia Asocio de Toskandevenoj en la Mondo) kaj "Federazione Italiana della Donne nelle Arti, Professioni e Affari" (Itala Federacio de la Virinoj en la Artoj, Profesioj kaj Negocoj).

Regis la vesperon, dum kiu inter alie okazis la legado de la mirinda 5-a kanto de Purgatorio de la Dia Komedio de Dante Alighieri, la libera dulingva katedro de Dante kaj Mezepoka Kulturo.

Okaze de tiu manifestacio en la Salono "Duecento" oni inaŭguris ekspozicion de interesaj libroj kaj dokumentoj pri la historio de la lingvo Esperanto. En la legado partoprenis vira kaj virina voĉo, la lasta estis tiu de Sarah Borgiotti.

Por redoni la etoson de la vespero kaj la emociojn de la ĉeestantoj, ni ĉi-sekve prezentas la lastajn versojn de la 5-a Kanto de Purgatorio:

"Ha, kiam vi revenos en la mondon,
vi, ripozinte post vojaĝo longa",
tria spirit' daŭrigis post la dua,
"pri mi memoru, kiu estas Pia:
Sjena min faris, malfaris Maremma.
Ĝin scias kiu, jam doninte ringon,
min edzinigis ja per gemo sia".

La ĉeesto de Senatano Pietro Bargellini, fama verkisto kaj eksurbestro de Florenco donis apartan literaturan signifon al la vespero. Post la legado, la kritika klarigo de la fama "Dantisto" prof. Navarro Guarducci de la 5-a Kanto ĵus legata kulminis la altnivelan vesperon. Ekzemplerojn de la dulingva "Dia Komedio" oni donacis al Urbestro kaj al reprezentantoj de la organizintaj asocioj.

Alaho diras....

Hussian Al-Amily el Bagdad en Bremen

Hussian Mohammed Al-Amily, komercisto kaj UEA-delegito en Bagdad, Irako, restadis dum 2 tagoj en Bremen kaj gastis ĉe tieaj esperantistoj. Ĉi-sekve ni publikigas la impresojn de du Bremenaj esperantistoj pri la gasto el la "lando de 1001 noktoj" laŭ la Informilo 3/77 de esperanto grupo bremen:

S-ro Hartig: Mi ne scias, kiu pli profitis el la vizito, nia gasto aŭ ni. Aŭskultante al liaj ĉiam bonhumoraj kaj spritaj raporto, ni sentis nin en la lando de 1001 noktoj.

Bedaŭrinde s-ro Al-Amily restis nur du tagojn en nia urbo; sed tiu tempo estis plenŝtopita per diversaj aranĝoj. La unuan tagon zorgis ges-roj Grebe pri lia bonfarto. Tiu tago finiĝis en gaja rondo en nia "Ratskelo". La duan tagon transprenis ges-roj Hartig la klopodojn pri la bonfarto de nia gasto. Ni diskutis pri lingvaj problemoj, interesaj el niaj diversaj vidpunktoj, ni ekskursis al la urba centro kaj al la Poche-Muzeo, ni butikumis - la tempo tro rapide pasis. Ripoztempoj estis dum la manĝadoj en la familia rondo.

La krono estis la rekompensa regalo de s-ro Al-Amily por siaj gegastigantoj per festa vespermanĝo en agrabla restoracio. La adiaŭo estis fino kaj nova komenco: "Ĝis baldaŭa revido - eble sekvontjare!" Liaj lastaj vortoj sonas ankoraŭ en niaj oreloj.

S-ro Grebe: Ankaŭ mi nur povas diri: Espereble la anoncita vizito venontjare okazos! Matene mi iris por akompani lin de la hotelo al mia lernejo. Jam survoje nia vizitanto el Irako kaj mi bonege interbabilis. Poste miaj gekolegoj, kiuj aŭdis nin, miris pri la flua interparolado. En malgranda rondo (kun la lernejestro, la sekretariino ktp.) ĉe kafo kaj teo montriĝis la brila bonhumoro de nia gasto. La bibliotekistino, kiu ĉeestis, intertempe prunteprenis de mi Esperantan lernolibron!

En la lasta leciono de tiu tago mi kunvenigis la lernantojn de nia (libervola) Esperanto-kurso. Venis ankoraŭ aliaj gelernantoj el mia klaso, entute pli ol 20 personoj. Per bildoj kaj esperantlingvaj klarigoj s-ano Al-Amily kiel lerta esperantisto pruvis la taŭgecon de nia internacia lingvo.. Do, tian varbadon ni bezonas!

Ankaŭ mia edzino promesis al mi, pli fervore okupi sin per Esperanto, ĉar post la tagmanĝo en mia domo ni vigle diskutis pri multaj problemoj ekzemple de la islama kaj kristana mondoj. Tiu ĉi vizito pliriĉigis niajn homajn rilatojn, niajn konojn kaj subtenis niajn klopodojn. Dankeme ni memoras pri nia kara vizitanto el Bagdad.

Ankoraŭ nun ni aŭdas la ofte de s-ro Al-Amily elparolitan frazo-komencon: "Alaho diras....", kaj ni esperas reaŭdi tion tre baldaŭ.

Oficiala inaŭguro en Hamburg

Hamburg (pp) - Hamburga Esperanto-Societo oficiale inaŭguros sian Klubejon (en Hamburg- Langenfelde, Vehrenkampstr. 15-17) ĵaŭde, la 24-an de marto, je la 16-a horo per gazetara konferenco. Por la inaŭguro oni atendas politikistojn kaj la najbarojn kiuj loĝas proksime al la klubejo. Je la 19-a horo s-ino M. Haudebine, Paris, faros sian lumbildprelegon pri Hindujo.

Dum la jarĉefkunveno la 10-an de februaro oni reelektis s-inon Elisabeth Wielgus, prezidanto de HES. Aliaj funkciuloj: Milan Sudec, vic-prezidanto; Peter Weide, ĝenerala sekretario; Werner Bernhardt, kasiisto; Johann Eitmann, bibliotekisto.

Dum la jaro 1976 HES kunvenis entute 49-foje; la Zamenhof-feston ĉeestis 65 personoj.

Opinioj - reagoj

Cetere, via bulteno, s-ro Pickel, meritas subtenon ĉar via linio estas vere io nova, originala, memstara paŝo, rapide efika informilo.

Bertil Englund, Hof, F R Germanio

Mi jam pli frue sendis al vi por viaj revuoj informilon pri niaj paskaj kursoj en Cuxhaven. Danke al tio ke vi publikigis la informon, nin atingis kelkaj informpetoj, eble aliĝoj. Mi do ŝatus preni ĉi tiun okazon por danki al vi.

Klaus Schubert, Hamburg, F R Germanio

Dankon pro la de vi senditaj kopioj de "Pilo-Press" kun la artikoleto "Reggio Calabria kaj Esperanto". Tiu publikigo multe helpos nian Esperanto-varbadon en la Urbo Reggio Calabria, precipe inter la fervojistoj.

Germano Gimelli, Bologna, Italio
Sekretario de I.F.E.A.

En Pola Radio mi aŭdas regule viajn bonegajn Pilo-Press-informojn, kiuj jam estas neforlaseblaj partoj de Pola Radio. Vi subtenas eminente Polan Radion, ili klopodas sincere disvastigi vian famon per la radio-ondo, do unu mano lavas la alian... Manus manum lavat....Tre ĝuste, kara s-ro Pickel! Pluan bonegan kunlaboron!

D-ro J. Kondor, Neuwied, F R Germanio

Vagado sub palmoj

Aperis foto-represo de la libro "Vagado sub palmoj" de Jean Ribillard, eldonita de Artur E. Iltis, Saarbrücken 1977 laŭ la eldono Rotterdam 1956. Formato 13,2 x 20,3 cm, broŝ., 52 p., prezo 5,30 GM. Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, F R Germanio.

Pola monero kun portreto de Zamenhof

Varsovio (pp) - Roman W. Rutkowski, redaktoro de "Dziennik Wieczorny", Bydgoszcz, sendis al ni jenan interesan informon: Laŭ la oficiala eldonplano de Pola Nacia Banko la monero kun portreto de d-ro Ludoviko Zamenhof aperos en 1980. Oni ĝin emisios en la serio "Grandaj poloj"; nominalvaloro estos 100 zlotoj, arĝento, eldonkvanto ne malpli ol 50 000 ekz. Ĝis nun nenie aperis oficiala ŝtata mono havanta ligan kun la Internacia Lingvo aŭ kun ĝia iniciatoro. La supran informon donis en sufiĉe ampleksa intervjuo pri la emisiagado de Pola Nacia Banko magistro Jerzy Bartkiewicz, vicdirektoro de la Emisia Trezorejo de Pola Nacia Banko por "Biuletyn Numizmatyczny", n-ro 9/117, novembro 1976, paĝoj 171-173, monata revuo de Numismatika Komisiono de Pola Arkeologia kaj Numismatika Societo.

Esperanto en Radio

Oni nuntempe parolas multe pri "homaj rajtoj", ankaŭ en la Esperanto-elsendoj de Varsovio kaj ankaŭ de Radio Vieno. En venonta aparta bulteno "Esperanto en radio" ni publikigos la ĉi-koncernajn tekstojn por doni al la legantoj la eblecon mem formi siajn opiniojn. Estas fakto ke ni vivas momente en kriza fazo de la malstreĉeca procezo. Kaj tiu kriza situacio respeguliĝas ankaŭ en kelkaj partoj de la Esperanto-elsendoj. Kaj ni konsideras nian taskon noti tiun fakton!

Vieno: La ĉi-ĵaŭda mezonda elsendo de Ö Regional je la 18,50 horo estis bonege aŭdebla, ni eĉ sukcesis surbendigi la elsendon kvinminutan, kiu diskonigis kelkajn informojn pri E-aranĝoj en Aŭstrio kaj felietonon pri la vilaĝeto "Totzenbach".

Varsovio dum februaro ricevis 358 korespondantojn. La plej multaj korespondantoj venis el Sovetunio. FR Germanio estas je la dua loko kun ĉ. 50 korespondantoj.